

**Kluba Programo:****majo:**

- 3 Socia Vespero
- 10 Ludvespero
- 17 John Wells: *Lingva Seminario*  
(1800h: konsilantaro)
- 24 Socia Vespero
- 31 Davido Thornell: *La Antikvaj Olimpiaj Eventoj*.  
(Prezento pri ne nur la sportkonkursoj de la helenoj, sed ankaŭ ties art- kaj muzik-konkursoj, kiuj triope konsistigis la famajn eventojn antaŭ pli ol du jarmiloj)

**junio:**

- 7 Terry Page: *Ateliero – "Blaza Blazonado"*  
(1800h: konsilantaro)
- 14 Socia Vespero
- 21 John Wells: *Lingva Seminario*
- 28 Socia Vespero

**julio:**

- 5 Davido Thornell: *Usona sendependiĝo*  
(Kvankam tiun militon oni ofte priskribas kiel revolucion, ĝi efektive ne estis tia – ĉar ĝi temis nur pri apartiĝo for de la Britia Koloniario.)

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*


**Esperanta Kalendaro:**

10-12 majo: Brita Kongreso 2013, Ramsgate. Informo: [eab@esperanto.org](mailto:eab@esperanto.org), 01782 372141

20-27 julio: 98a Universala Kongreso, Rejkjaviko, Islando. [http://uea.org/kongresoj/uk\\_2013.html](http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html)

20 - 23 septembro: Internacia Amikeca Renkontiĝo, Aylesford, Kent. Informilon/aliĝilon petu de Anica Page, [anica\\_page@btinternet.com](mailto:anica_page@btinternet.com), aŭ 01908 564004

7 – 9 junio: Somera Renkontiĝo en Kardifo, Cardiff/Caerdydd. Pri programo kaj aliĝ-kondiĉoj informiĝu ĉe <http://esperantocardiff.wordpress.com/somera-renkontiĝo>

**Kies Blazono?**

**Demando facile respondebla, ĉu ne?** La blazon-ŝildon de la Reĝino de Britio - aŭ, pli ĝuste, de la aktuala suvereno de Britio - ĉiu tre ofte vidas, kaj do bone konas. Sed ĉu vi ankaŭ scias, kiaj aliaj personoj rajtas, en ĉi tiu lando, posedi propran blazonon? Kion fari, por elekti, ricevi kaj registri ĝin? Kiel ĝuste nomi ĝiajn kolorojn, la manieron, laŭ kiu ĝi estas disdividita, kaj la figurojn, kiujn ĝi surhavas?

En la ateliero *Baza Blazonado* (7an de junio) oni respondos multajn demandojn tiajn, kaj ankaŭ provizos vin per materialoj kaj helpo, tiel ke vi povu elpensi kaj krei simplan blazonon por vi mem - neoficialan, bedaŭrinde! Devizon, en Esperanto aŭ en iu ajn alia lingvo, vi rajtos mem jam elekti kaj surloke aldoni. Nu, nepre partoprenu!

*Terry Page*

**Aliaj anoncoj:**

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a junio por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:

18:00 - 19:15 renkontoj, babilado

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,  
50-52 Camden Square, NW1 9XB  
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 [esperanto-sleg@tiscali.co.uk](mailto:esperanto-sleg@tiscali.co.uk).

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,

Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,

11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 [yarrump@gmail.com](mailto:yarrump@gmail.com).

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto), Michael Sims, Matt Peperell.

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) [lek-sekretario@gmail.com](mailto:lek-sekretario@gmail.com);

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ [ap\\_esp-lek21@yahoo.co.uk](mailto:ap_esp-lek21@yahoo.co.uk),

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY [acj.rawlinson@ntlworld.com](mailto:acj.rawlinson@ntlworld.com).

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Nia JARKUNSIDO estis glata afero, kiun prezidis PROF. JOHN WELLS. Jen du novaĵoj tiurilataj: S-ino ELENA SHERSTNYOVA

volonte ne rekandidatiĝis kiel Konsilanto; kaj S-ro MATT PEPERELL unuafoje elektiĝis kiel Konsilanto. Oni do dankas Elenan pro ŝiaj por-klubaj laboroj dum 2012 kaj gratulas al Matt pro lia sukceso!

Ankaŭ menciindas lastatempaj korespondaĵoj. Kelkaj anoncis planatajn vizitojn de eksterlandaj Esperantistoj al Londono kaj specife al la LEKejo. Samideanoj el, interalie, Japanio kaj la Ĉeĥa Respubliko entuziasme kontaktis interrete por diskuti gastigadon ktp. Oni antaŭguas ties alvenon kaj partoprenon en la vendredaj kunvenoj.

Kaj kiel ĉiuj bone scias, la forsezono por kongresoj ktp alproksimiĝas rapide. Tamen, ni ne pasigu tro da tempo en feriplanado anstataŭ en LEK-kunvenoj inter nun kaj la feriado mem. Venu por ekzercado; venu por kolekti promesojn regali postferie per aventur-rakontoj; fine, venu por ke eĉ pli vigla Klubo atendu vian revenon!

Sincere,

*David Thornell*

